
横浜エスペラント会のエスペラント文会報

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Memore al la 3a datreveno de la granda cunamo en 2011-03-11, ni kolektis eseojn pri tio.



## NIAJ KLASOJ KAJ KURSOJ

Ni havas regulajn klasojn kaj kursojn, kaj de la lasta decembro ĝis la venonta aprilo, kelkaj klasoj havis/os ŝanĝojn. Pri tio vidu en la suba tabelo. La ejo estas ĉe nia regula kunvenejo, Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj. Sed kiam ni malsukcesas rezervi ĉambrojn, ni kunsidas en aliaj publikaj kunvenejoj.

Cetere, ni havas korusan grupon, kiu kunsidas 2 fojojn monate en publikaj trejnejoj.

| tago | klaso | # | gvidanto | lernolibro / legata libro, ktp |
|---|---|---|---|---|
| sabato, 15h00–17h00 | daŭriga | 2 | NANBA Humiharu | (ĝis jan. 2014) ″Hanako lernas Esperanton″ |
| | rudimenta | | | (komencota en apr. 2014) |
| | meza (de s-ino Doi) | 5 | DOI Ĉieko | (ĝis dec. 2013) ″Tra Dezerto kaj Praarbaro″; (de jan. 2014) diversaj legaĵoj, ekz-e ″Raporto de la 100-a Japana E-Kongreso″ |
| | LANTI | 4 | DOI Hirokaz | ″Vivo de Lanti″ |
| | Jokohama Salono | 7 | (sen aparta gvidanto) | 1a kaj 3a semajno de monato: (ĝis dec. 2013) ″Alico en Mirlando″; (de jan. 2014) diversaj legaĵoj elektitaj el interreto |
| | | | | 2a semajno de monato: Ĉiu verkas sian eseon, kaj interkritikas. |
| | | | | 4a semajno de monato: Ĉiu tradukas sian elektaĵon esperanten, kaj interkritikas. |
| merkredo, 14h00–16h00 | merkreda | 5 | DOI Ĉieko | (ĝis jan. 2014) ″Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj″; (de feb. 2014) ″Barbro kaj Eriko″ |
| ĵaŭdo, 19h00–20h30 | daŭriga | 2 | DOI Ĉieko | ″Hanako lernas Esperanton″ |

# = maksimuma nombro de klasanoj lastatempaj, inkluzive de la gvidanto

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO,Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: http://www.hamarondo.org
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

# TIEL OKAZIS

## EN "INTERNACIA FORUMO" DE JOKOHAMO

*la 9-a de februaro, 12h00-12h50, en la domo de JICA

Ni prelege prezentis nian agadon kun la titolo: "Kunvivado de multaj kulturoj kaj Esperanto", de Sibayama Zyun'iti al la civitanoj. Sed ĉu pro neĝo, nur 3 aŭskultis ĝin, krom niaj rondanoj mem. Ni tamen gratulu nin ke ni povis ja prelegi; la prelegserio estis planita por du tagoj, sed duonon da tago oni nuligis pro tro multa neĝado, escepta en nia urbo.

# Intervjuo al s-ro Lee Jung-kee

Mizro Iwaya

Komence de februaro mi iris al Koreio kaj interparolis kun s-ro Lee Jung-kee. Li estas fame konata aktivulo de Esperanto. Li delonge prezidas Esperanto-centron nomatan Seula Esperanto-Kulturcentro, mallonge SEK. En la lasta jaro li fariĝis estrarano de UEA. Jen sekvas skiza enhavo de nia interparolo. (L= s-ro Lee Jung-kee, I= Mizro Iwaya)

*I: Mi aŭdis ke vi okazigas esperantan kurson en Seula Esperanto-Kulturcentro.*

L: Jes, mi havas bazan Esperanto-kurson en ĉiu sabato de la tria ĝis la sesa posttagmeze. Unu kurso daŭras unu monaton, sume kvar fojojn. En februaro ni havos ties 265-an fojon.

*I: Kiom da kursanoj venas al via kurso?*

L: Ĉirkaŭ 10. Tio estas plena de SEK, ĉar ĝi estas malvasta. Lastatempa tendenco estas ke gefiloj de iamaj kursanoj aliĝas al la kurso laŭ la instigo de la gepatroj.

*I: Kian alian klason vi gvidas?*

L: En merkredo ni havas mezgradan klason en SEK. La lernantoj estas aŭ iamaj bazaj kursanoj aŭ aliaj komencintoj.

*I: Ĉu vi gvidas aliajn klasojn ekster SEK?*

L: Jes, mi havas tri esperantajn klasojn en du universitatoj ĉirkaŭ Seulo. Do mia libera tago krom dimanĉo estas nur mardo.

*I: En la lasta jaro vi elektiĝis estrarano de UEA. Kian taskon vi havas tiurilate?*

L: Mi havas ĉefe du taskojn. Unu estas azia movado kaj la alia estas ordigo de Esperanto-centroj en la mondo. Rilate al la unua, oni okazigos unuan Iranan Kongreson en la venonta marto. Kvar koreoj partoprenos en ĝi inkluzive de mi. Post tio mi iros al Rotterdamo por ĉeesti en la estrara kunsido. Rilate al la dua tasko, mi devas ordigi la aferojn por plu disvolvi la aktivecon. Ankaŭ Esperanto-Domo de Jacugatake estas unu el gravaj Esperanto-centroj en la mondo.

*I: Ĉu vi havas konstantan kontakton kun aliaj estraranoj?*

L: Jes, du fojojn en unu monato ni havas komunan skajpan kunsidon de la estraranoj dum du horoj. Ekzemple en februaro ni hovos ĝin en la unua kaj la 15a. Krom tio ni havos komunan skajpan kunsidon kun TEJO en la 8a. Estraranoj loĝas en diversaj urboj de la mondo, tial hor-ordigo estas malfacila problemo. Mi komencas konferencon malfruvespere je la 11a kaj duono. La prezidanto Mark Fettes skajpas frumatene en Kanado.

*I: Kial vi fariĝis estrarano de UEA. Ĉu iu rekomendis vin?*

L: Ne. Fakte mi estis membro de Elekto-Komisiono por estraranoj. Devis ekzisti unu azia estrarano. Mi rekomendis kelkajn aziajn kandidatojn sed ili detenis sin. Do restis nenia elekto krom mi mem.



*I: Do ĉiukaze mi esperas al vi bonan sukceson en via estrarana aktivado. Samtempe bonan sukceson en Esperanto-movado en via lando.*

## ESEOJ

# Helpo al la orfoj pro cunamo je 2011-03-11
## — la agadoj de la organizaĵo "Aŝinaga-Ikueikai" —

TANIGAWA Hirosi

Grandega tertremo kaj cunamo atakis en la 11a de marto 2011, Japanan Nord-Orientan Distrikton. Ĉirkaŭ 20 mil homoj pereis pro la Katastrofo. Multaj infanoj, geknaboj perdis aŭ la patron, aŭ la patrinon, aŭ ambaŭ.

Mi skribas speciale pri la helpoj fare de "*Aŝinaga Ikuieikai*" (mallonge *Aŝinaga*), Ne-Profita Organizaĵo. Ĝi stipendias georfojn jam de antaŭ 40 jaroj, kaj pri tio mi skribas en la fino. Ĝi faras specialan helpon al la georfoj de la Katastrofo.

**(1) speciala financa helpo**

Tuj post la Katastrofo *Aŝinaga* komencis detale esplori la statojn de la geknaboj perdintaj la gepatrojn. Ĝis la fino de la marto 2013, *Aŝinaga* donis al 2 073 georfoj, po pli ol 2 milionoj da enoj, de ĵusnaskitoj ĝis universitataj studentoj. Ĉi tiun monsumon la helpitoj povas uzi por ia ajn celo, kaj ne bezonas redoni estontece.

**(2) helpo rilate al la mensa zorgo al la georfoj**

*Aŝinaga* nun konstruas specialajn domojn, kie oni akceptas la tertrem-cunamajn georfojn, por mense zorgi ilin. La georfoj vizitas la domon, kaj la trejnitaj terapiistoj zorgas ilin.

La domoj estas nomataj "La Domoj de Ĉielarko." La domoj estas nun konstruataj en la urboj Rikuzen-Takata, Iŝinomaki, kaj Sendai.

**(3) internacia bonkoro**

De la 24a de marto ĝis la 3a de aprilo 2013, francoj, nome anoj de St-Germain-en-Laye, bonvenigis 20 japanajn cunamo-orfojn (mez- kaj altlernejanaj) en sia urbo. La japanaj geknaboj estis varme akceptitaj kiel hejmanoj ĉe la urbo, kaj spertis ekscitan kunlernadon ĉe Lycee Internacia Lernejo. Ili vizitis la Muzeon de Louvre, kaj la Palacon de Versejlo. Tiu "Internacia Bonkoro" donis al la invititaj cunamo-orfoj profundan emocion kaj kuraĝigon, — raportis la akompanantino de la trupo, kiun organizis ĝuste *Aŝinaga*.

**(4) Internacia koncerto**

Pri tio legu la februaran numeron de nia organo!

**Pri AŜINAGA-IKUEIKAI**

Ĝi provizadis dum 40-plusaj jaroj stipendion, al la geknaboj perdintaj unu aŭ ambaŭ gepatrojn, kaŭze de malsano, akcidento, sin-mortigo aŭ katastrofo. Tion ebligadis diversaj monoferoj, inter kiuj estas "*Aŝinaga-san*" (laŭvorte: Paĉjo, Panjo Long-Kruraj).

La ofermono al *AŜINAGA IKUEIKAI* en 2012 (jan-dec) atingis proksimume 5 884 milionajn enojn (t.e. ĉ. 45 milionaj eŭroj).

Tabelo 1: monata monsumo de la stipendioj de *Aŝinaga* por 2013
("La Jara Raporto de *AŜINAGA IKUEIKAI* 2012")

| lernejoj | | enoj | eŭroj |
|---|---|---|---|
| altaj kaj superaltaj lernejoj | ŝtataj kaj komunumaj | 25 000 | 195 |
| | privataj | 30 000 | 234 |
| universitatoj, kolegioj | ĝeneralaj | 40 000 | 312 |
| | specifaj | 50 000 | 390 |
| altaj, superaltaj metilernejoj | | 40 000 | 312 |
| kursoj por diplomatigo, doktoreco | | 80 000 | 624 |
| provizoraj, por eniri en | privataj altlernejo | 300 000 | 2340 |
| | privataj universita | 400 000 | 3120 |

Tabelo 2: nombro de stipendiuloj

| kasa jaro | nombro de stipendiuloj (*) | nombro de patronoj (**) |
|---|---|---|
| 2010 | 6 018 | 28 566 |
| 2011 | 5 974 | 34 077 |
| 2012 | 5 924 | 35 060 |

(*) t.e. orfaj lernantoj kaj studentoj
(**) t.e. Paĉjoj Long-Kruraj

# Vizito al la urboj atakitaj de granda cunamo (2)

KOYAMA Takesi

(4) La urbo Tooni

En la 13a de decembro 2013, post vizito al la urbo Oocuĉi ni ekveturis per buso al la urbo Tooni, kiu situas sude de la urbo Kamaiŝi, por intervidi kun la lernantoj de elementa lernejo kaj mezlernejo en Tooni. Ĉar ni partoprenantoj estis subtenantoj de Tooni-Edukfonduso por la lernantoj damaĝitaj de la cunamo. Survoje ni haltis antaŭ la monumento pri granda cunama memoraĵo. Ĝi staras fronte al la golfo Tooni, kiu enkondukis la furiozan grandan cunamon en la kvartalon de Tooni. La monumento estas ĉirkaŭ 2.5 metrojn alta kaj surface estis gravurita grandaj literoj “Transdonu daŭre al posteuloj grandan cunamon 2011.3.11（伝えつなぐ大津波)” por neforgesi teruran cunamon.

Mi elbusiĝis kaj supreniris deklivaĵon kun pakaĵo al la mezlernejo Tooni. Survoje mi vidis proksime detruitan digon kaj sendoman kvartalon kaj fore sur altaĵo viciĝis domoj.

En Tooni la elementa lernejo estis detruita de cunamo kaj la mezlernejo estis damaĝita de tertremo. Tial lernantoj de ambaŭ lernejoj lernas en la provizora 2-etaĝa lerneja konstruaĵo konstruita norde de mezlerneja korto. En la elementa lernejo estas 63 lernantoj kaj en la mezlernejo estas 40. Ĉiuj klasoj havas ĉirkaŭ 10 lernantojn. Ni vizitis ilin kaj vidis gelernantojn lerni vigle kvankam estas malmultaj samklasanoj. Poste ni tagmanĝis per manĝoservo en lernejo kune kun kelkaj lernantoj.

Posttagmeze ni ĉeestis en la interkona kunsido kaj mi ĝuis harpon de s-ino C. Sack kaj koruson de lernantoj de ambaŭ lernejoj. Precipe la fervora koruso de lernantoj de la unua lernojaro tre plaĉis al mi.

Mi vizitis la urbojn atakitajn de granda cunamo kaj malgajiĝis plurfoje vidante detruitajn digojn kontraŭ cunamoj kaj sendomajn kvartalojn. Sed fine mi havis la esperon al geknaboj de la elementa lernejo, kiuj diligente kantis tutkorpe.




la monumentoj en Tooni




En la pasinta vintro, nia urbo Jokohamo estis atakita de NEĜO. Nu, 30 centimetroj da akumulo ne indus je 'atako' al nordlandanoj, sed al ni troe. La unua neĝ-ondo venis la 7an kaj la 8an de februaro. Inter ni, la klaso SALONO nuliĝis, sed aliaj du klasoj (MEZA de s-ino Doi kaj LANTI de s-ro Doi) ja okazis, kun reduktitaj partoprenintoj. Mi aŭdis pri ilia malfacila hejmeniro en vespero. La dua neĝ-ondo venis la 14an kaj la 15an de februaro, kaj tiam, ĉiuj tri klasoj nuligis sian lernokunsidon.